Alzaco rendevuas kun ekologio!

Eŭropo Ekologio Alzaco arigas gecivitanojn de la tuta Alzaco, balotajn elektitojn de la plej suda parto (Sundgau) ĝis la plej norda ĉe Wissembourg, asociajn respondeculojn, membrojn de la verduloj, de la Sendependa Ekologiista Movado kaj aktivulojn de la regionalista partio Unser Land. Unuafoje de 23 jaroj, **alzacaj ekologiistoj kandidatiĝas unuiĝintaj** ĉe la regionaj balotoj.

Ĉar balotantoj manifestis tiun deziron okaze de la lastaj eŭropaj balotoj, ili decidis eliri siajn tradicie rezervitajn kampojn, superi la vundaĵojn de la pasinteco, la ordinarajn ide-klivojn en la publika agado.

Ili decidis kuniĝi ĉar **Alzaco bezonas, ke ekologio kapablu atingi celojn** de nia epoko. Tiuj defioj estas multnombraj, ekologiistoj proponas al ili kune respondi.

Pli ol cent mil Alzacanoj estas senlaboraj, dekmiloj estas devigataj labori laŭ truditaj partatempaj laborskemoj kaj baraktas en malstabila vivsituacio, tro da gejunuloj ekigas sian plenkreskulan vivon ĉe senelira vojo: ne reflikadon kaj aranĝetojn ili bezonas. La verda ekonomio kaj ekologia konverto de aktivaĵoj kapablas krei daŭrajn kaj ne alilokeblajn laborpostenojn.

Pli kaj pli da Alzacanoj suferas pro malbonaj loĝkondiĉoj, pro toksa aero, pro ekscesaj hejtadkostoj, pro bruo, pro malsekura urba medio kaj pro sanmalfavoraj vivkondiĉoj: forlasante familiojn, urbojn kaj municipojn je sia senhelpa sorto, Alzaco ne relanĉos sian humanisman idealon. Bonestadon kaj trankviligon oni atingos per regiona kontrakto pri konkretaj solidarecoj.

La naturmedio malantaŭeniras je pli ol 1000 hektaroj jare: la precipa agrikulturo eraras plu per unuspecia kultivado de maizo: malkoheraj pecoj da « verda kontinuo » kaj pinĉo da ekologia manĝaĵo en niaj teleroj ne sufiĉos por restarigi la kvaliton de la akvo, kiun ni trinkas nek por reteksi biodiversecon.

En Alzaco, la klimato varmiĝos! La strasburgaj temperaturoj estos baldaŭ tiuj de Montélimar (sudfranca urbo) kaj dramaj veteraj epizodoj plioftiĝos: ne per regionaj rapidtrajnoj kaj per publikaj transportrimedoj kun kapacito limigita je 15% el la alzaca enloĝantaro nia regiono sukcesos enteni tiun plivarmiĝon kaj adaptiĝos, eĉ malpli per elektra klimatizado.

La **klimata defio kaj la energia celo** sekvigos **konsiderindajn subitajn ŝanĝojn** por nia ekonomio, agrikulturo, transportrimedoj, vivstiloj kaj kondutoj. Sur tiuj kampoj rolas la alzaca efikeco: nek per **novaj aŭtoŝoseoj** (ekzemple la orienta ĉirkaŭŝoseo de Strasburgo), nek per **nuklea obstino**, sed per la rimedoj de la **verda ekonomio**.

Nia regiono pliriĉiĝas per sia kultura diverseco kaj dulingvismo, tion oni plifortigu. Alzaco disfloros danke al **nova transrejna kunlaborado** kaj danke al sia kapablo aliĝi al la **tutplaneda solidareco** de la 21a jarcento. La ĝeneraligita uzado de dulingveco en instruado tiel, kiel en la publika medio ebligos plene instali nian regionon en ĝian rejnan kulturan kaj ekonomian medion kaj tiel ĝi firmigos sian statuson de vera eŭropa regiono.

La ekologiistoj kuniĝis ĉar **ne simple sufiĉas alarmi** aŭ ŝanĝeti rande la direkton de konservativaj administraj politikoj. La ekologiistoj kuniĝis por proponi al Alzaco etapojn por ĝia necesa transformado: ili pretas **ŝofori**.

La ekologiistoj scias, ke la amplekso kaj de la celoj kaj de la civitanaj atendoj postulas novan regmanieron kaj majoritatan forton por Alzaco. Ili proponas fokusi rigardon koheran kaj komunan al la **regiona teritoria aranĝskemo**: ili proponas agi per nova **viglo planada**.

Por respondi al tiuj defioj kaj servi al bonestado de alzacaj loĝantoj, ni modifos la regionan regmanieron per:

- **gvida asembleo**, por difini kaj konduki kunaranĝitajn strategiojn kaj adaptitajn laŭ la trajtaro de tiu ĉi teritorio, eĉ se ĝi ne havas reglamentajn povojn, la regiono povas mobilizi sian konvinkpovon :

- **engaĝitaj elektitoj**: por firmigi sin, la mesaĝon pri agado de la regiono portu surterenen la elektitoj. La regiona regmaniero funkcios same kiel ŝtata registaro, kun prezidanto *(ĉefministro)*, animanto de la regskipo, kaj vic-prezidantoj *(ministroj)* respondecaj pri stirado de apartaj sektoroj de la regiona agado.
- **rekoncentriĝo al la prioritatoj**: la financaj rimedoj de la regiono estos limigitaj: ili estos koncentritaj je prioritatoj por esti efikaj. Ni tial ĉesigos la monan surŝutetadon por ke la rimedoj, je kiuj ni disponos fariĝu potencaj ŝanĝopeliloj.
- **loko por ellabori socialan pakton**: por venki la defiojn de la estonto necesas agi preter la antagonismoj traarkantaj la socion kaj necesas trovi legitiman lokon, kie oni povu intertrakti pri la sociala pakto: la regiono disponas ĉion por tia misio: la regionaj strategioj estos difinitaj kune kun la koncernaj agantoj kaj ni faros el la sociala kaj ekonomia komitato la lokon de la definitivaj traktoj inter la diversaj konsisteroj de la alzaca socio.

Tiu ĉi manifesto estas skizo de projekto kiun ni volas porti por Alzaco. Ni volas ĝin vivigi kun vi. Kaj ni esperas trovi vin flanke de ni por pli justa, pli solidara, pli respondeca kaj pli ekologia Alzaco.

Por Alzaco noviga kaj agema fronte al ekologiaj defioj

Regiono pinte efika en la venontaj jardekoj, devas kapabli je energia efikeco kaj je forta malkreskigo de poluado. Regiono tia devas kapabli bremsi kreskon de la elektra konsumado (+13% inter 2002 kaj 2007) por konformigi sin al la eŭropaj celoj redukti la konsumnivelon je 20% kompare kun 1990. Regiono tia kapablu diversigi siajn energifontojn kaj alniveligi la kontribuon de renoviĝantaj energioj je ties necesa produktnivelo (30%), konkorde kun la ambiciaj celoj de niaj transrejnaj najbaroj. Regiono tia partoprenas en reduktado de forcejefikaj gasoj kaj trovu rimedojn por eviti du saturiĝojn: tiun pro rubaĵoj kaj tiun pro vojtrafiko.

La Regiono estos la katalizilo de la ŝanĝo sur la alzacaj teritorioj kaj kunordigos la tutan klimatan agoplanon de komunumoj por teni regionskale la ĝeneralan gas-ellasan reduktocelon (-40% antaŭ 2020 agante pri industrio, la serva sektoro, la transportrimedoj, la varm-izol-rekapabligo de loĝejoj) kaj por komenci la klopodojn adaptiĝi al la klimata misagordiĝo.

PROPONO 1:

Lanĉi **negativvatan planon** per konsummastrumado kaj energiefikeco por **redukti ĝis 30% antaŭ 2020 la tutregionan energikonsumadon** de Alzaco kompare kun 1990.

PROPONO 2:

Elpaŝi ekster la nuklean seneliran vojon **transformante la elektroproduktejon de Fessenheim** en laboratorion pri centraldismuntado. Tiu projekto unika en Eŭropo estos faktoro de novigo, de allogeco de nia teritorio kaj de laborpostena kreado.

PROPONO 3:

Disvolvi **regionan branĉon de elstareco koncerne renoviĝantajn energiojn**, sektoron kun fortaj dungaj eblecoj agante per investado en entreprenajn kaj privatulajn projektojn, subtenante muntadon de lokaj projektoj kaj organizadon de novigaj centroj .

PROPONO 4:

Starigi kun aliaj komunumoj « **Planon pri rubaĵoj kiel resurso**» celanta redukton de rubaĵoj je ties produktfonto, strukturigon de lokaj traktad- kaj revalorigad-branĉoj kaj favorante alternativajn modojn de enfosado kaj forbruligado.

PROPONO 5:

Difini novan regionan strategion komunan pri daŭripova urbanismo ekzistanta en transrejna dimensio, kiu ebligas ĉesigi urbosterniĝon kaj lukti kontraŭ spaca disapartigado, garantiante paralele la loĝrajton. Estas necese adapti la aranĝon de nia teritorio por ke moviĝeblecoj estu elekteblaj kaj ne suferige trudataj kaj por ke uzi ĉiumatene sian veturilon ne estu devige plu.

PROPONO 6:

Komenci transportrevolucion rezignante pri novaj vojinfrakstrukturoj (orienta kaj suda ĉirkaŭŝoseoj de Strasburgo aŭ norde de Mulhaŭzo) kaj detiri disvolvrimedojn por eksterŝosea transportado finfine impostante la ŝarĝoveturilojn sur niaj ĉefaj veturvojoj. La Regiona Konsilio adoptos Regionan aranĝskemon de la teritorio kaj de la transportrimedoj.

PROPONO 7

Koherigi publikajn transport-retojn (regionan, departementan kaj lokan) koncerne la investadon, la itinerojn, la ekspluatadon, la tarifaron (kreskigi la vetur-eblojn por ricevantoj de minimuma enspezo). Antaŭ 2020, pli ol 50% de la profesikiala ĉiutaga pendolvojaĝado estu plenumita per publikaj kaj malplej CO2-ellasaj transportrimedoj. Plirapidigi la transformadon de stacidomoj en krucpunktojn de diversaj transportrimedoj, konektajn kaj interŝanĝajn spacojn, kaj lokon de civitaneco.

PROPONO 8:

Plifortigi la **publikan servon de regionaj trajnoj rifuzante ties privatigon**, favorante malfermojn de novaj linioj kaj disvolvante la ĝeneralan servoferton por teritoria plidensigo de la reto.

Al ekologia transformado de la ekonomio

La **krizo**, kiu forte trafas la Alzacanojn ne estas simpla vivakcidento: la alzaca ekonomio estas despli vundebla ke unu el ĝiaj trajtoj estas, ke ĝi suferas la pezon de malnoviĝanta industria modelo. Estus vane injekti milionojn da eŭroj por bonstate tenadi pasintepokajn, poluajn kaj alilokeblajn industriojn. Al relanĉo, kiu utilus nur por plidaŭrigi kaŭzojn de la krizo, ni kontraŭstare proponas la projekton de ekologia transformado de nia regiona ekonomio. Ne plu temas pri simptomoj mildigendaj sed ja temas pri kaŭzoj, kiujn oni devas trakti per longperspektivaj solvoj.

PROPONO 1

Subskribi la unuan **kontrakton de ekologia transformo kun la aŭtomobila industrio**: ĝi inkluzivos tutan ĉapitron « ekonomian kaj industrian » cele al komenco de transiro de produktmanieroj al la produktado de « sobraj » aŭtoj kaj al publikaj transportoj kaj alian ĉapitron « **sekureco de laborposteno kaj trejnado** ».

Ĝenerale la ekonomiaj aktivaĵoj estos kondukataj al agmanieroj pli respektemaj de la naturmedio kaj sociale respondecaj.

Tiamaniere koncerne turismon, gravan sektoron de la alzaca ekonomio, la regiono ĉesigos ĉian subtenon al kaperaj projektoj similantaj al industria turismo kiel la tiel nomata « Bioscope » kaj la turismejo Pierre et Vacances, spronante anstataŭe iniciataron rilatajn kun **ekologia turismo**, kiu apogas sin sur vivantaj riĉecoj (tiaj, kia la tiel nomata Ecomusée).

La **cifereca ekonomio kaj verdaj komunikteknologioj** estos integritaj en la transformstrategion atentante lukti kontraŭ la teritoria kaj sociala cifereca klivo (malriĉaj homoj, kiuj ne povas pagi al si retalireblon ekzemple).

PROPONO 2:

Revizii subtenkondiĉojn al entreprenoj inkluzivante interalie **devigajn kaj altpostulajn naturmedi- protektajn kaj socialajn kriteriojn**. La regiona agado ne favoros necertajn postenojn kaj trudatajn partatempajn laborkondiĉojn sed utiligos la gajnojn de produktiveco ne por malaperigi laborpostenojn sed por dividi la laboreblecojn.

PROPONO 3

Adopti **Regionan disvolvskemon pri sociala kaj solidara ekonomio**, por pli bone strukturigi tiun branĉon de la ekonomio, kiu jam reprezentas pli ol **11% el la alzacaj laborpostenoj**. Ĝia kapablo superas la ununuran reensociigon de homoj perdintaj sian laboron kaj ĝi estas cisterno da vivlokproksimaj kaj sociale utilaj postenoj tiel en la homhelpa servosektoro (helpo al maljunuloj ekzemple) kiel en la fako de naturmedia protektado. Temas resume pri alia maniero entrepreni, labori kaj konsumi, kiun ni volas kuraĝigi kaj disvastigi en Alzacon. Regiona informcentro ebligos diskonigi sciindaĵojn pri tiu sektoro kaj dividi kun aliaj homoj la bonajn agmanierojn de la koncernaj agantoj.

PROPONO 4

Difini **regionan strategion pri novigo** kaj pri esplorado rekoncentrita pri esencaj sektoroj de la **verda ekonomio**: renoviĝantaj energioj, toksologio, kemio, naturmedia sano, agroekologio kaj revalorigado, recikligado de rubaĵoj.

PROPONO 5

Subteni sur la diversaj subteritorioj la aperigon de **lokaj strategioj por disvolvi dungitecon**, valorigante la lertecon de la teritorioj kaj disvolvante novigajn agadojn.

La regiono inkluzivos la **transprenon de entreprena aktiveco** disvolvante agadojn ĉe metiistoj kaj treetaj firmaoj, faciligante la intergeneracian transdonadon de aktiveco kaj promociante la plufunkciadon de entreprenoj aparte fare de salajruloj kadre de kooperativo.

PROPONO 6

Efektivigi la rajton pri trejnado unuflanke kiel rimedon por sekurigi la profesiajn vivovojojn kaj aliflanke kiel ekologian modernigilon de nia ekonomio. La trejnoferto estos strukturigita ĉirkaŭ demokratigo de partopreno en trejnkursoj (en tiu kadro la nacia asocio por profesia trejnado de plenkreskuloj estu plifortigita) kaj ĉirkaŭ adapto al novaj metodoj kaj teknologioj de la verda ekonomio.

PROPONO 7

Tiri **profesiajn komencajn trejnkursojn** al rango de **sociale progresigaj**, altpostulaj kaj altkvalite edukaj studvojoj per lernado en firmao kaj per lernado en lernejo. Eksterklasĉambra lernado en profesia medio estos optimumigita kaj reguligata per regiona konvencio por **entrepreno trejna kaj ne diskriminacia**.

Por naturmedio protektata kaj harmonia vivmedio

Ĉiujare biodiverseco iras plu retroen en Alzaco kaj nia Regiono lamas dum la internacia celo estis ĉesigi tiun erodadon de biodiverseco antaŭ 2010. Multajn sektorojn oni kontribuigu komencante per agrikulturo, kies intensiva agmaniero kaj troa uzado de pesticidoj difektis la akvan kaj grundan kvaliton. Tiu diverseco estas parto de la riĉeco de nia Regiono, necesas do relerni kiel vivi kun la naturo en urbo same kiel en kamparo.

PROPONO 1

Rekonkeri la alzacan **biodiversecon**, kunlabore kun la ŝtato kaj la komunumoj per **Regiona planskemo pri ekologia kohereco**, kiu kunordigu la politikojn je diversaj skaloj kaj kiu estu deviga por urboplanado kaj infrastrukturaj projektoj. Estos taskite al regiona observad-instanco prisekvi la evoluon de la skemo.

Aparte oni zorgos pri humidaj areoj, pri sekaj paŝtaj herbejoj, kaj pri la Vogeza medio, kies erodado plu okazas laŭ netolerebla ritmo.

PROPONO 2

Kuraĝigi **agrikulturon**, ke ĝi disvolvu produktadon kaj agmanierojn konformajn kun la regiona interesaro rilate **dungadecon**, **nutraĵkvaliton**, **efikon al la naturmedio** (grundakvo, kotofluo, biodiverseco...) kaj malfacile alireblajn areojn (montaro, ktp...). Alzaco metos sian pezon en la decidpesilon por ke la venonta reformo de la Komuna Agrikultura Politiko konfidu al regionoj aljuĝadon de helpmono kadre de la unua piliero laŭ tiuj kriterioj, kaj tiel donu al Alzaco la renovigilon por ties agrikulturo.

PROPONO 3

Ĉesigi la unuspecian kultivadon de maizo kaj relanĉi plurspecian kultivadon por kontraŭbatali la samigadon de la pejzaĝoj kaj de la grundoj. La Regiona Konsilio subtenos ĉefe la transformojn al ekologia kultivado por atingi kaj superi la celojn de la loka komisiono pri akvo SAGE Ill-Akvotavolo-Rejno, kiuj alstrebas, ke 10% da agrikultura surfaco estu antaŭ la jaro 2015 ekologia kultivsurfaco. La Regiona Konsilio strebos ankaŭ superi la celojn de la tiel nomata « Interkonsento de Grenelle » (naciskala politika pintdiskuto, kiu naskis longperspektivan planon por daŭripova evoluigo), t.e. havi en Alzaco 20% da ekologie kultivataj surfacoj antaŭ 2020. Por tion atingi, la Regiono disvolvos komencajn kaj daŭrajn trejnadojn pri ekologia kaj biodinamika agrikulturo kaj faciligos instaliĝon de junaj agrikulturistoj same kiel de ekologiaj produktantoj per aparta biena politiko.

PROPONO 4

Firmigi en la daŭro **kampulan kaj kvalitan agrikulturon**, strukturigante mallongajn vendcirkvitojn tiel por ekologia manĝaĵo kiel por konvencia agrikulturo, direkte kaj al la kolektiva satigsektoro kaj al la privatuloj (strukturigado kaj subtenado al **komune apogata agrikulturo** (franclingve AMAP strukturigado kaj subtenado de gardantoj de kampula agrikulturo)). Subteni **bredadon kiu respektas**

bonestadon de bestoj, konformigante sin al altpostulaj normoj rilate koncentritecon laŭ kvadratmetro, rilate viv-, transportad- kaj nutradkondiĉojn.

PROPONO 5

Garantii ĉies **aliron al trinkebla akvo**, ne antaŭtraktita. Starigi ĝeneralan kaj koheran mastrumadon de akvo regionskale, kun **konsidero al la tuta akvociklo**. Necesas rebonkvalitigi la akvon subteran kaj surteran, respektante la jamajn sindevontigojn kaj la devigojn de la kadra direktivo pri akvo, interalie rilate la dumvintran grundokovradon, la plivastigon de mastrumskemoj al ĉiuj akvofluoj kaj kunordigadon de la agado « **ĉesu pesticidoj** » por la komunumoj (kompletige al la akvoagentejo) kaj por la privatuloj.

PROPONO 6

Pra-statigi la dinamikon de la **Rejno** per **rekunligo de ties iamaj akvobrakoj** kaj per restarigo de la rejna arbaro. La **plivastigo de polderaj areoj kaj de areoj kun agrikultura disŝprucado** havos du funkciojn: lukti kontraŭ inundoj kaj restarigi la **ekologian subakvigadon intencan**, kiu kontribuos al flegado de la humidaj areoj.

PROPONO 7

Preventi la **malsanojn rilatantajn kun vivstilo** certigante kvalitan nutradon, garantiante al Alzacanoj sanfavorajn kaj ekologiajn loĝejojn, garantiante protektadon kontraŭ poluo kaj nocaĵoj (interalie sonaj). La Regiona Konsilio postulos seriozan studon pri la porsanaj de la novaj infrastrukturoj. Ĝi preventos sanproblemojn rilatajn al **dominterna aerpoluo** interalie per subteno al ekologia konstruado, garantiante la **naturmedi-respektan kvaliton de la konstruaĵoj** ne nur rilate al energiŝparado. Pri tiu temo, translandlima informcentro estos kreita kaj funkciigata partnere kun profesiaj kaj asociaj agantoj de la sektoro por eltrovi kaj disvastigi la konojn kaj bonajn agmanierojn.

Por solidara Alzaco, riĉa je sia diverso

La regiona projekto ebligu pli bone kunvivadi en trankvila socio. La Regiono kontribuu al teksado de solidarecoj kun la plej malfortaj, inter ĉi tieaj aŭ alilokaj homoj kaj komunumoj. La regiona estonteco konstruiĝos danke al ĉiuj civitanoj, kaj la Regiona Konsilio ludos rolon de faciliganto kaj peranto de la publika debato.

PROPONO 1

Fari el la **solidareco kaj egalrajteco** la angulŝtonon de la publika agado, motorate de specifa vicprezidanteco. Ĉi tio konkretiĝos per konstanta zorgado pri la socialaj sekvoj de la realigataj politikoj. **Skemo pri vivlok-proksimaj publikaj servoj** garantios teritorian egalecon, dum la lukton kontraŭ diskriminacioj oni kondukos per apartaj agadoj koncerne aliron al justico. Por la homoj plej foraj de dungiteco, starigi **fidindajn trejnkursojn pri la franca lingvo** kaj pri bazaj scioj estas nepra antaŭkondiĉo por ke ili povu sekvi kompletan trejn-itineron.

PROPONO 2

Progresigi la ideon ke ĉio en la regiono estu **alirebla** por handikapuloj kaj homoj kun malsama movkapablo. La regiono enprenos la tiel nomatan planon « **Réflexe handicap** » en sian agadon pere de la agprogramo agendo 22, teritori-skala kunordiga skemo de la politikoj pri handikapeco. La franca gestolingvo kaj transskribado en brajlon estos iom post iom enprenataj en la komunikkulturon de la regiono. Alirebleco fariĝos devigo en konstruaĵoj konstruitaj kaj subtenataj de la Regiono.

PROPONO 3

Progresigi **regionan identecon vivantan kaj riĉan** en sia diverso. La dulingveco estas samtempe valora heredaĵo kaj bonega atuto por Alzaco kaj la estonteco de Alzacanoj. Sekve, estas grave nuntempigi dulingvecon, disvolvante **dulingvajn kompetentojn**. La ekzisto de dulingvaj klasoj estas daŭrigenda ĝis la duagrada diplomo (Baccalauréat), kaj la profesia trejnado inkluzivu tiun trajton, tiel ke ĉiuj lernantoj havu la eblon elekti la dulingvan instruadon. Alzaco posedas fortan identecon, kaj por ĝin valorigi, dum la mandato larĝskala konsultiĝo aperigos emblemajn markilojn de tiu komuna identeco: flagon, blazonon, logotipon...

La **publika aŭdvida servo** devos alproprigi refleksojn de lingva diverseco kaj proponi televidajn kaj radiajn elsendojn en la alzaca lingvo. La publikaj servoj grande plibonigos sian alireblon por la alzaclingvaj civitanoj.

La Regiono cetere starigos **novpensitan kunlaboradon kun la disvolviĝantaj landoj** laŭ la diverseco de la alzaca loĝantaro kaj laŭ ties enmigrada historio.

PROPONO 4

Lanĉi planon por **urba solidareco kaj ekologia loĝmaniero**, kiu estu unuflanke pakto kontraŭ **ekskludo** de malbonkondiĉe loĝantaj homoj kaj senhejmuloj, aliflanke ankaŭ rimedo por subteni la ekologian loĝmanieron kadre de sociala kaj solidara ekonomio. Diversa kaj partopreniga, ĝi estos la ilo de la regiono por batali kontraŭ **misloĝado**.

PROPONO 5

Igi al ĉiuj kulturon pli travivebla favorante **helpon al etaj kulturlokoj** dise en la tuta Alzaco, nome malprofite al pezaj, buĝetvoraj kulturcentroj. Faciligi traviveblon de kulturo al la tuta junularo lerneja kaj metilerna, interalie per plioftigo de renkontebloj, en ĉiuj instruejoj, **kun ĉiaj belartistoj**, teatristoj kaj kinistoj. Firme subteni artistojn, teatrajn trupojn, sendependajn **kulturproduktantojn** kadre de akordoj subskribitaj kun la Regiono.

PROPONO 6

Igi liceojn, metilernejojn, socialajn kaj publik-sanajn trejnadcentrojn lokoj, kiuj **edukas al ekologia civitaneco**, al praktikado de **demokratio**, al kulturaj iniciatoj, al socialaj metilernadoj, al luktado kontraŭ diskriminacioj. Garantii al ĉiuj **kvalitan edukadon** provizante ilin per la necesaj helpiloj fizikaj kaj pedagogiaj (longperspektive, ankaŭ per **senpageco de la nepraj lerniloj kaj lernolibroj**). Certigi la efektivan integriĝon de la neinstruista dungitaro de la lernejo en la edukan komunumon.

PROPONO 7

Cele al pli da demokratio, debatigi publike la plej gravajn regionajn politikajn gvidliniojn, raportante pri agadoj kondukataj per disvolvado de **kontroliloj por civitanoj** pri gravaj publikaj servoj, faciligante

alireblon al informoj kaj ekspertizoj, partoprenigante la civitanec-progresigan asocian sektoron, subtenante ĉie per la **Ekonomia kaj Sociala Alzaca Konsilio** la partoprenigajn agmanierojn pere de **regiona komisiono pri debatoj**. Alimaniere regi kun gecivitanoj signifas multe malfermi la regionan institucion al la socio kaj plifortigi la dialogon kun tiuj, kiuj vivigas la regionon: asocioj, sindikatoj, movadoj. Temos pri tio, **ĉesi disdoni monon kvazaŭ kiel oficisto ĉe giĉeto sed pli ĝuste starigi partnerecojn** kun aliaj komunumoj, kun la asociaj kaj ekonomiaj agantoj.

PROPONO 8

En la nuna debato pri reformado de la teritoriaj komunumoj, plifortigi la **regionskalan spacon kiel demokratan spacon**, kiu portas iniciatojn kaj promesplenajn eksperimentojn. La regiono disponu je **daŭrstabilaj financrimedoj**, je pli ampleksa kompetentaro kaj je **demokrata kaj reprezenta procezo por nomumi la elektitojn**, kiuj ĝin regas. Tiaj estas la bazoj de originala modelo de **diferencigita federismo**, kiu estas la dezirinda estonteco de la decentrigo de la povo.

Ekologio en Alzaco: nun!

Komencante hodiaŭ balotkampajnon, gekandidatoj de la listo Eŭropo Ekologio Alzaco submetas al la balotantoj tiujn 4 aksojn derivitajn en 31 proponojn. Tiuj ĉi konsistigas la tenajn trabojn de ilia projekto por Alzaco.

Tio estas la unua etapo: tiu de la Forumo de Eŭropo Ekologio Alzaco. Tiu demarŝo de kolektiva ellaborado komenciĝis en julio kaj ties fina pintmomento estis la regiona forumtago de la 17a de oktobro: tiu ĉi manifesto estas la rezulto de tiu laboro.

Temas nun pri tio, komenci la duan etapon: renkontiĝi kun la civitanoj, kun la ĉiutagaj agantoj, kun la reala socio.

Tiel, dum la venontaj semajnoj, la ekologiistoj aŭskultos, debatos, interŝanĝos sur la reala tereno. Mergante ĉi tiujn 31 proponojn en la publikan debaton, ili ambicias pliriĉigi ilin por deploji Densan programon, celofirman kaj kredindan.

Dimanĉon la 14an de marto okazos la unua balotvico dum kiu, ĉiu povos libere elekti la ekologiistan projekton, validigi konscie la juston de tiuj proponoj.

Je ĉi tiu nuna horo, kiam la registaro estas forigonta la laŭvoĉkvante proporcian regionan balotsistemon, kiam ĝi estas senstrukturigonta la regionon en multnombrajn distriktetojn, dum ĝi kontestas la financajn kaj politikajn rimedojn necesajn al agado de la regionoj, la civitanoj povos utiligi tiun lastŝancan baloton por esprimiĝi. La tempo por agi etiĝas senĉese plu, por venki la defiojn pri la klimato, pri energio kaj pri biodiverseco, por kontraŭstari la firman celon de S-ro Sarkozy fuŝi la regionan politikan spacon.

La 14a de marto estos okazo por klare montri sian favoron al renovigemo de la regiona kaj teritoria politiko, por intenco planada de la ekologia transformado, por regiona kontrakto pri teritoria solidareco.

La 14an de marto estos ŝanco ne mistrafinda por komuna vivkvalito, por ekonomio al ĉiuj profitdona, por Alzaco pionira en mondo, kiun ni deziras pli ekologia, pli trankvila, pli solidara.

L'Alsace a rendez-vous avec l'écologie!

Europe Ecologie Alsace rassemble des citoyennes et des citoyens de toute l'Alsace, des élus du Sundgau à Wissembourg, des responsables associatifs, les adhérents des Verts, du Mouvement Ecologiste Indépendant et les militants du parti régionaliste de Unser Land.

Pour la première fois depuis 23 ans, les écologistes d'Alsace se présentent unis aux élections régionales.

Ils ont choisi, parce que les électeurs en ont manifesté le désir lors des élections européennes, de dépasser les prés carrés, les blessures du passé, les clivages ordinaires de l'action publique. Ils ont choisi de se rassembler parce que l'Alsace a besoin que l'écologie soit à la hauteur des enjeux de notre temps. Ces défis sont nombreux, les écologistes proposent de les relever ensemble.

Plus de cent mille Alsaciens sont au chômage, des dizaines de milliers sont contraints aux temps partiels imposés et galèrent dans la précarité, trop de jeunes entament leur vie adulte dans des voies de garage ou des impasses : ce n'est pas de replâtrage et de mesurettes dont ils ont besoin. L'économie verte et la conversion écologique des activités sont en mesure de créer des emplois durables et non délocalisables.

De plus en plus d'Alsaciens souffrent du mal logement, d'un air toxique, de charges de chauffage excessives, du bruit, d'un environnement urbain insécurisant et de conditions de vie insalubres : ce n'est pas en abandonnant les familles, les cités et les communes à ellesmêmes que l'Alsace relancera son idéal humaniste. Le bien-être et l'apaisement passeront par un contrat régional de solidarité concrète.

La nature recule de près de 1000 hectares chaque année ; l'essentiel de l'agriculture se fourvoie encore dans la monoculture du maïs : ce ne sont pas des lambeaux de « trame verte » et un soupçon de bio dans l'assiette qui rétabliront la qualité de l'eau que nous buvons et retisseront la biodiversité.

En Alsace, ça va chauffer! Les températures strasbourgeoises seront bientôt celles de Montélimar et les épisodes météos dramatiques seront plus fréquents: ce n'est pas avec des TER et des transports collectifs aux capacités limitées à moins de 15% des Alsaciens que notre région limitera ce réchauffement et s'y adaptera, encore moins avec des climatisations électriques.

Le défi climatique et l'enjeu énergétique vont entraîner des mutations considérables pour l'économie, l'agriculture, les transports, nos modes de vie et nos comportements. C'est là que se joue la performance alsacienne : ni par de nouvelles autoroutes (le GCO par exemple) ni par l'obstination nucléaire, mais par les ressources de l'économie verte.

Notre région s'enrichit de sa diversité culturelle et de son bilinguisme, il faut le fortifier. L'Alsace s'épanouira par une nouvelle coopération rhénane et par sa capacité à s'inscrire dans la solidarité planétaire du XXI ème siècle. La pratique généralisée du bilinguisme dans l'enseignement ainsi que dans l'espace public permettra d'inscrire pleinement notre région dans son espace culturel et économique rhénan – participant ainsi à conforter son statut de véritable région européenne.

Les écologistes sont rassemblés parce qu'il ne suffit plus simplement de lancer des alarmes ou d'infléchir à la marge les politiques gestionnaires conservatrices. Les écologistes sont rassemblés pour proposer à l'Alsace les étapes de sa transformation nécessaire : ils sont prêts à en actionner les commandes.

Les écologistes savent que l'ampleur des enjeux et les attentes citoyennes nécessitent une gouvernance et une majorité nouvelle pour l'Alsace. Ils proposent de cibler une vision cohérente et partagée d'aménagement du territoire régional ; ils proposent pour agir une nouvelle vigueur planificatrice.

Pour pouvoir répondre à ces défis et servir le bien être des habitants de l'Alsace, nous modifierons la gouvernance régionale :

- une assemblée chef de file, pour définir et conduire des stratégies concertées et adaptées à la

personnalité de ce territoire ; à défaut de disposer de pouvoirs réglementaires, la Région peut mobiliser son pouvoir de conviction ;

- des élus impliqués : pour s'affirmer, le message de la Région doit être porté sur le terrain par les élus ; la gouvernance régionale fonctionnera à la manière d'un gouvernement, avec un président (premier ministre), animateur de l'équipe de gouvernance, et des vice-présidents (ministres) responsables de la conduite d'un secteur de l'action régionale ;
- un recentrage sur les priorités : les moyens financiers de la Région sont limités : ils seront concentrés sur les priorités pour être efficients ; nous mettrons ainsi un terme au saupoudrage pour que les moyens dont nous disposons deviennent des leviers puissants ;
- un lieu d'élaboration du pacte social : les défis de l'avenir suppose de dépasser les antagonismes qui traversent la société et de trouver un lieu légitime où puisse se négocier le pacte social ; la Région est dotée pour cette mission : les stratégies régionales seront définies avec les acteurs concernés et nous ferons du comité économique et social le lieu de l'ultime négociation entre les différentes composantes de la société aldsacienne.

Ce manifeste est une esquisse du projet que nous voulons porter pour l'Alsace. Nous voulons le faire vivre avec vous. Et espérons vous retrouver à nos côtés pour une Alsace plus juste, plus solidaire, plus responsable et plus écologique.

Vers une Alsace innovante et mobilisée face aux défis écologiques

Une Région performante pour les décennies à venir, c'est une Région capable d'efficacité énergétique, et de réduction forte de ses pollutions. C'est une Région capable d'enrayer la croissance de sa consommation électrique (+13% entre 2002 et 2007) pour se conformer aux objectifs européens de réduction de 20% par rapport aux niveaux de 1990. C'est une Région capable de diversifier ses sources d'énergie et d'amener les énergies renouvelables à leur part nécessaire (30%), en accord avec les objectifs ambitieux de nos voisins rhénans. Une Région qui prend sa part des réductions des émissions de gaz à effet de serre et qui trouve les moyens d'éviter 2 saturations: celle des déchets et celle du trafic routier.

La Région sera le catalyseur du changement dans les territoires d'Alsace et coordonnera l'ensemble des plans climats des collectivités pour tenir au niveau régional les objectifs globaux de réduction des émissions (-40% d'ici 2020 en agissant sur l'industrie, le tertiaire, les transports, la réhabilitation thermique des logements) et mettre en œuvre les efforts d'adaptation au dérèglement climatique.

PROPOSITION 1

Engager un plan Négawatt de maîtrise de la consommation et d'efficacité énergétique afin de réduire de 30% d'ici 2020 la consommation énergétique globale de l'Alsace par rapport à 1990.

PROPOSITION 2

S'émanciper de l'impasse nucléaire en convertissant la centrale de Fessenheim en laboratoire du démantèlement. Ce projet unique en Europe sera facteur d'innovation, d'attractivité du territoire et de création d'emplois.

PROPOSITION 3

Développer une filière régionale d'excellence des énergies renouvelables, secteur à forts débouchés pour l'emploi en agissant sur l'investissement pour les projets des entreprises et des particuliers, le soutien au montage de projets locaux et l'organisation de pôles d'innovation.

PROPOSITION 4

Mettre en œuvre avec les autres collectivités un Plan Déchets Ressources visant la réduction des déchets à la source, la structuration de filières locales de retraitement et de valorisation et en privilégiant les modes alternatifs à l'enfouissement et incinération.

PROPOSITION 5

Définir une nouvelle stratégie régionale partagée d'urbanisme durable inscrite dans la dimension rhénane, qui permette de stopper l'étalement urbain et de lutter contre la ségrégation spatiale tout en garantissant le droit au logement. Il faut adapter l'organisation de notre territoire pour que la mobilité puisse être choisie et non subie et que prendre sa voiture chaque matin ne soit plus une obligation.

PROPOSITION 6

Engager la révolution des transports en renonçant aux nouvelles infrastructures routières (GCO – Rocade sud de Strasbourg ou Nord de Mulhouse...) et dégager les moyens de développement du fret non routier en taxant enfin les poids lourds sur nos axes principaux. Le Conseil Régional adoptera un Schéma régional de l'aménagement du territoire et des transports.

PROPOSITION 7

Mettre en cohérence les réseaux de transports collectifs (régional, départemental et local) pour les investissements, les tracés, l'exploitation, les tarifications (faciliter l'accès aux allocataires de minimas sociaux). D'ici 2020 plus de 50% des déplacements pendulaires devront pouvoir être opérés en transports collectifs et transports doux. Accélérer la mutation des gares en carrefour de l'intermodalité, lieux de communication, d'échange et de citoyenneté. PROPOSITION 8

Renforcer le service public des trains régionaux en refusant sa privatisation, en privilégiant l'ouverture de nouvelles lignes et en développant l'offre globale de service pour un meilleur maillage du territoire.

Vers la transformation écologique de l'économie

La crise qui frappe fortement les Alsaciens n'est pas un accident de parcours: l'économie alsacienne est d'autant plus vulnérable qu'elle reste caractérisée par le fort poids d'un modèle industriel vieillissant. Il serait vain d'injecter des millions pour maintenir en l'état des industries obsolètes, polluantes ou délocalisables. A une relance qui ne servirait qu'à prolonger les causes de la crise, nous opposons le projet de la conversion écologique de notre économie régionale. Ce ne sont plus les symptômes qu'il faut soulager mais bien les causes qu'il faut traiter par des solutions à long terme.

PROPOSITION 1

Conclure le premier contrat de conversion écologique avec l'industrie l'automobile: il inclura un volet « économique et industriel » visant à engager la transition des modes de production vers la voiture sobre et vers les transports collectifs et un volet « sécurité de l'emploi et formation ».

Globalement, les activités économiques seront accompagnées vers des pratiques plus respectueuses de l'environnement et socialement responsables.

Ainsi pour le tourisme, important secteur de l'économie alsacienne, la Région cessera tout soutien aux projets prédateurs relevant d'un tourisme industriel à l'image du Bioscope et de Pierre et Vacances, au profit d'un tissu d'initiatives d'éco tourisme s'appuyant sur les richesses vivantes (telles l'Ecomusée). L'économie numérique et les technologies vertes de l'information seront intégrées à la stratégie de conversion tout en veillant à lutter contre la fracture numérique territoriale et sociale.

PROPOSITION 2

Réviser les mécanismes de soutien aux entreprises en y incluant notamment des critères environnementaux et sociaux obligatoires et exigeants. L'action régionale ne favorisera pas des emplois précaires et des temps partiels subis mais amènera les gains de productivité à partager le travail plutôt qu'à détruire l'emploi.

PROPOSITION 3

Adopter un Schéma régional de développement de l'économie sociale et solidaire, pour mieux structurer cette branche de l'économie qui représente déjà plus de 11% des emplois alsaciens. Son cadre dépasse la seule insertion des personnes en rupture professionnelle et elle est un vivier d'emplois de proximité et d'utilité sociale tant dans le secteur des services à la personne que dans le domaine de l'environnement. C'est donc une autre manière d'entreprendre, de travailler et de consommer que nous voulons encourager et répandre en Alsace. Un centre régional de ressources permettra de diffuser les connaissances sur ce secteur et de mutualiser les bonnes pratiques des acteurs.

PROPOSITION 4

Définir une stratégie régionale de l'innovation et de la recherche centrée sur les secteurs essentiels de l'économie verte : énergies renouvelables, toxicologie, chimie, santé environnementale, agro-écologie et revalorisation - recyclage des déchets.

PROPOSITION 5

Soutenir dans les différents bassins l'émergence de stratégies de développement local pour l'emploi, valorisant les savoir-faire des territoires et développant des actions innovantes.

La Région y inclura la reprise d'activités en développant des actions auprès des artisans et des TPE facilitant le passage de relais intergénérationnel ainsi qu'en promouvant les reprises d'entreprises par les salariés en particulier sous la forme coopérative.

PROPOSITION 6

Rendre effectif le droit à la formation comme outil de sécurisation des parcours professionnels et comme levier de la modernisation écologique de notre économie. L'offre de formation sera structurée autour de la démocratisation de l'accès aux dispositifs (à ce titre l'AFPA doit être consolidée) et de l'adaptation aux technologies et méthodes nouvelles de l'économie verte.

PROPOSITION 7

Hisser les formations professionnelles initiales par l'apprentissage et par la voie scolaire au rang de filières de promotion sociale, d'exigence et de haute qualité éducative. L'alternance en milieu professionnel sera optimisée et régulée par une convention régionale de l'entreprise formatrice et non discriminante.

Vers un environnement préservé et un cadre de vie harmonieux

Chaque année la biodiversité continue de reculer en Alsace et notre Région est à la traîne alors que l'objectif international était de stopper cette érosion d'ici 2010. De nombreux secteurs doivent être mis à contribution à commencer par l'agriculture dont la pratique intensive et l'usage abusif de pesticides ont dégradé la qualité des sols et de l'eau. Cette diversité fait partie des richesses de notre Région il faut donc réapprendre à vivre avec la nature en ville comme à la campagne.

PROPOSITION 1

Reconquérir la biodiversité alsacienne, en coopération avec l'Etat et les collectivités par un Schéma régional de cohérence écologique qui coordonne les politiques des différents échelons et soit contraignant pour les plans d'urbanisme et les projets d'infrastructures. Un observatoire régional sera chargé de son suivi.

Un soin particulier sera consacré aux zones humides, aux prairies sèches, au milieu vosgien, dont l'érosion se poursuit à un rythme intolérable.

PROPOSITION 2

Encourager l'agriculture qui développe des productions et des pratiques d'intérêt

régional au regard de l'emploi, de la qualité alimentaire, de l'impact environnemental (nappe, coulées de boue, biodiversité...) et des zones difficiles (montagne etc). L'Alsace pèsera pour que la prochaine réforme de la Politique Agricole Commune confie aux Régions l'attribution des aides du premier pilier sur ces critères, et donne ainsi à l'Alsace le levier du renouveau de l'agriculture. PROPOSITION 3

En finir avec la monoculture du maïs et relancer la polyculture pour combattre l'uniformisation des paysages et des sols. Le Conseil Régional soutiendra majoritairement la conversion à l'agriculture biologique afin de dépasser les objectifs du SAGE Ill-Nappe-Rhin de 10% de la surface agricole en bio d'ici 2015 et du Grenelle de l'environnement de 20% de la surface agricole d'ici 2020. Pour ce faire, la Région développera les formations (initiale et continue) sur l'agriculture bio et en biodynamie et facilitera l'installation des jeunes agriculteurs en bio via sa politique foncière.

PROPOSITION 4.

Pérenniser une agriculture paysanne et de qualité, en structurant les circuits courts pour le bio comme pour l'agriculture conventionnelle, en direction de la restauration collective comme des particuliers (structuration et soutien aux AMAP). Soutenir un élevage respectueux du bien-être animal qui se conforme à des normes exigeantes en terme de concentration par m², de conditions de vie, de transport et d'alimentation.

PROPOSITION 5

Garantir l'eau potable accessible pour tous sans traitement préalable. Etablir une gestion globale et cohérente de l'eau à l'échelle régionale prenant en compte la totalité du cycle de l'eau. Il convient de restaurer la qualité des eaux souterraines et des eaux de surface en respectant les engagements déjà pris et les obligations de la Directive-cadre eau notamment couverture hivernale des sols, élargissement à tous les cours d'eau des schémas de gestion , et coordination pour les collectivités (en complément de l'Agence de l'eau) et les particuliers des actions « zéro pesticides».

PROPOSITION 6

Rendre sa dynamique au Rhin en rétablissant les connexions des anciens bras et en restaurant la forêt rhénane. L'extension des zones de polder et d'épandage aura deux fonctions la lutte contre les inondations et la restauration de submersions écologiques participant à la préservation des zones humides.

PROPOSITION 7

Prévenir les maladies du mode de vie en assurant une alimentation de qualité, en garantissant aux Alsaciens des logements salubres et écologiques, une protection contre les pollutions et les nuisances (notamment sonores). Le Conseil Régional exigera une étude sérieuse d'impact sanitaire pour les nouvelles infrastructures. Il anticipera les problèmes sanitaires liés à la pollution de l'air intérieur notamment par le soutien à la construction écologique, garantissant la qualité environnementale des bâtiments au delà des seules économies d'énergie. Sur ce sujet, un centre de ressources transfrontalier sera créé et porté en partenariat avec les acteurs professionnels et associatifs du secteur pour recenser et diffuser les savoirs et bonnes pratiques.

Vers une Alsace solidaire et riche de ses

diversités

Le projet régional doit permettre de « mieux vivre ensemble » dans une société apaisée. La Région doit contribuer à tisser des solidarités avec les plus faibles, entre les personnes et entre les collectivités d'ici ou d'ailleurs.

L'avenir régional se construira avec tous les citoyens et le Conseil Régional jouera un rôle de

facilitateur et de médiateur du débat public.

PROPOSITION 1

Faire de la solidarité et de l'égalité des droits la pierre angulaire de l'action publique, portée par une vice présidence spécifique. Elle se traduira par un souci constant de prise en compte de l'impact social des politiques mises en œuvre. Un schéma des services publics de proximité sera garant de l'égalité territoriale et la lutte contre les discriminations fera l'objet d'actions ciblées d'accès au droit. Pour les plus éloignés de l'emploi, la mise en place de formations solides en français et sur les savoirs de base est le préalable nécessaire à tout parcours de formation.

PROPOSITION 2

Promouvoir une région accessible pour les personnes en situation de handicap et à mobilité différente. La région intégrera le réflexe handicap dans son action via un agenda 22 – schéma de coordination des politiques handicap d'un territoire. La langue des signes française et la retranscription en braille seront progressivement intégrées à la culture de communication de la région. L'accessibilité deviendra la règle dans les bâtiments construits et soutenus par la Région.

PROPOSITION 3

Promouvoir une identité régionale vivante et riche de ses diversités. Le bilinguisme est à la fois un héritage précieux et un formidable atout pour l'Alsace et l'avenir des Alsaciens. Il est donc important de l'inscrire dans la modernité en développant les compétences bilingues. Les classes bilingues sont donc à pérenniser jusqu'au Baccalauréat et la formation professionnelle doit inclure cette dimension, de sorte que tous les élèves aient la possibilité de choisir l'enseignement bilingue. L'Alsace dispose d'une identité forte et pour la mettre en valeur, une large concertation fera émerger au cours du mandat les marqueurs emblématiques de cette identité partagée : drapeau, blason, logo ... Le service public de l'audiovisuel devra s'inscrire dans une démarche de diversité linguistique et proposer des programmes télévisés et radio en langue alsacienne. Les services publics amélioreront largement leur accessibilité pour les citoyens de langue alsacienne.

La Région mettra par ailleurs en œuvre un dispositif de coopération Nord Sud repensé se fondant sur la diversité de la population vivant en Alsace et son histoire migratoire.

PROPOSITION 4

Lancer un plan de solidarité urbaine et d'habitat écologique. A la fois pacte contre l'exclusion des mal logés ou des sans logis et dispositif visant à soutenir le tiers secteur de l'habitat écologique. Diversifié et participatif, il sera l'outil de la région pour combattre le mal logement.

PROPOSITION 5

Rendre la culture plus accessible à tous les publics en privilégiant l'aide aux petits lieux culturels dispersés dans toute l'Alsace et ce, aux dépens des grosses structures budgétivores. Faciliter l'accès à la culture pour toute la jeunesse scolaire et en apprentissage, en renforçant notamment dans les lieux d'enseignement la rencontre avec tous les artistes, les gens de théâtre et de cinéma. Apporter aux artistes, compagnies, structures indépendantes de production culturelle un soutien renforcé dans le cadre de conventions avec la Région.

PROPOSITION 6

Renforcer les lycées et CFA et les établissements de formation en sanitaire et social comme lieux d'éducation des éco-citoyens, d'exercice de la démocratie,

d'initiatives culturelles, d'apprentissages sociaux, de lutte contre les discriminations. Garantir à tous une éducation de qualité en apportant les aides matérielles et pédagogiques nécessaires (aller vers la gratuité des équipements et manuels indispensables). Assurer l'intégration effective des personnels de service au sein de la communauté éducative.

PROPOSITION 7

Pour plus de démocratie, mettre en débat public les grandes politiques régionales, en rendant compte de l'action menée en développant les outils d'un contrôle citoyen sur les grands services publics, en facilitant l'accès aux informations et aux expertises, en sollicitant le secteur associatif citoyen, en soutenant partout avec le Conseil Economique et Social d'Alsace, les pratiques participatives au travers d'une commission régionale des débats. Gouverner autrement, avec les citoyennes et les citoyens, signifie ouvrir largement l'institution régionale sur la société et renforcer le dialogue avec celles et ceux qui font aussi la région : associations, syndicats, mouvements. Il s'agira de passer d'une logique de guichet à des pratiques de partenariat avec les autres collectivités, avec le monde associatif et les acteurs économiques.

PROPOSITION 8

Dans le débat actuel sur la réforme des collectivités territoriales, renforcer l'échelon régional comme un espace démocratique porteur d'initiatives et d'expérimentations d'avenir. La région doit disposer de moyens de financement pérennes, de compétences élargies et d'un processus démocratique et représentatif de désignation des élus qui la gouvernent. Ce sont là les base d'un modèle original de fédéralisme différencié qui est l'avenir souhaitable de la décentralisation.

L'Ecologie en Alsace : maintenant !

En engageant aujourd'hui la campagne électorale, les candidats de la liste Europe Ecologie Alsace soumettent aux électeurs ces 4 orientations déclinées en 31 propositions. Celles-ci constituent les lignes de force de leur projet pour l'Alsace.

C'est une première étape : celle du Forum d'Europe Ecologie Alsace. Cette démarche d'élaboration collective s'est engagée en juillet, son point d'orgue a été la journée régionale du 17 octobre : ce manifeste en est le produit.

Il s'agit à présent d'engager la deuxième étape : celle de la rencontre avec les citoyens, les acteurs du quotidien, avec la société réelle.

Ainsi, au cours des prochaines semaines, les écologistes écouteront, débattront, échangeront sur le terrain. Leur ambition, en immergeant ces 31 propositions dans le débat public, c'est de les enrichir pour déployer un Programme dense, résolu et crédible.

Le dimanche 14 mars, premier tour des élections régionales, chacun aura ainsi la liberté de choisir le projet écologiste, de valider en connaissance de cause la justesse de ces propositions.

A l'heure où le gouvernement s'apprête à liquider le scrutin proportionnel régional, à déstructurer la région dans de multiples circonscriptions, à remettre en cause les leviers d'actions financiers et politiques des régions, les citoyennes et les citoyens pourront encore se saisir de ces élections de la « dernière chance ». Le temps nous est compté, à l'égard des enjeux du climat, de l'énergie et de la biodiversité, à l'égard aussi de la détermination sarkozyste à casser l'espace politique régional.

Le 14 mars sera l'occasion de se prononcer clairement pour un renouveau de la démocratie régionale et territoriale, pour un vaste dessein planificateur de la transformation écologique, pour un contrat régional de solidarité territoriale.

Le 14 mars sera une chance à saisir pour une qualité de vie partagée, pour une économie qui profite à chacun, pour une Alsace pionnière dans un monde que nous souhaitons plus écologique, plus apaisé, plus solidaire.